

Heinrich Heine,  
Printempa saluto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret'  
Tra de mi animon.  
Sonu printemo kantet'  
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,  
Kie floroj pendas!  
Diru al la roz', ke mi  
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]. Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier). Li verkis interalie la kantlibreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.*

Heinrich Heine,  
Softe vibras tra l'anim'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l'anim'  
melodi' tenera,  
flugu al la malproksim',  
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',  
kaj se tie ĉarme  
ridos roz', en mia nom'  
ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocájo, \*1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)*

*El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".*